


esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 6/2002
Dumonata bulteno eldonata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Decembro 2002

This issue of *Esperanto USA* is brought to you through the selfless support of Ellen Eddy.

Look inside for:

Local mailing lists	2
Li, ŝi aŭ kiu?	3
ENGLISH vs esperanto?	4
What is IGAPPO?	5
Roots and Polo	6
La Bonvolanoj	7
New Books	8-9
Korespondantoj	10-11



Donac-kupono de ELNA- libroservo

ELNA is now making available monetary gift coupons that can be used toward the purchase of anything in ELNA's catalog. The coupons cost, and are worth, \$25. They are usable for three years from date of purchase, and the expiration date may be extended for one year if an extension is requested before the expiration date on the coupon.

Nord-Amerika Somera Esperanto-Kursaro, School for International Training, Brattleboro Vermont, 2002



Pasporto - The tapes are ready!

See p. 7

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO

☎510/653-0998; 📠510/653-1468
✉elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Alexander Shlafer
Vice President/Vicprezidanto: Phil Dorcas
Secretary/Sekretario: Ellen M Eddy
Treasurer/Kasisto: William B Harris
Other Board Members/Aliaj estraranoj:
Thomas Alexander, Don Coleman, Peggy
Dolter, D Gary Grady, Angela Harlow,
Orlando E Raola, Jacob Schwartz, Tim
Westover, David Wolff

*Director, Central Office/Direktoro de la
Centra Oficejo:* Joel Brozovsky
*Vice Director, Central Office/Vicdirektoro de
la Centra Oficejo:* Donald Harlow

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the
Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 38, No. 6
ISSN 1056-0297

Editor/Redaktoro: Don Harlow
☎510/653-0998; 📠510/653-1468
✉donh@esperanto-usa.org

Materials for esperanto usa should be
sent to/Materialojn por esperanto usa
oni sendu al:

esperanto USA

PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO

or by e-mail/aŭ retroŝte al:
e-usa@esperanto-usa.org

The opinions expressed in this bulletin
are those of the authors, and don't neces-
sarily represent the point of view of ELNA
or its bulletin/La opinioj esprimitaj en ĉi
bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne
nepre prezentas la vidpunkton de ELNA
aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is
permitted, provided that due credit is
given, and a copy of the reprinted materi-
al is sent to ELNA/Estas permesate
reaperigi materialojn el ĉi bulteno,
kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj
ke oni sendu ekzempleron de la repu-
blikigita materialo al ELNA.

Deadline for issue 2003/2/Limdato por
numero 2003/2: 28.03.2003

Think Globally ... Communicate Locally

By Don Harlow

It is not too surprising that, given the fact that Esperanto is an "international language", far too many speakers of the language pay more attention to what is happening in Barcelona or Beijing than they do to those who live down the street. I throw no stones here; I'm guilty of the same "far-sightedness" (*malmiopo?*).

Nevertheless, those of us involved with promoting Esperanto should, from time to time, think about what we can do to spread the language locally. I would like, here, to make a suggestion that I think deserves the attention of every local group.

Years ago, Humphrey Tonkin, in an Esperanto Document, pointed out the distinction between the technology of communication and the linguistic aspect of it. At the time, the technology had become world-spanning, but the linguistic side, then as now, was woefully underdeveloped. Since Tonkin remarked on this, we have seen a remarkable improvement in the technology, through the medium of the internet; it is now possible, and cheap, to communicate with people all over the world in a matter of hours, minutes, or even seconds – the time delay depends less on the technology than on how much attention we pay to it. Esperantists have made good use of this, internationally; they, after all, have an advantage over other groups that claim to function globally – they can actually talk to each other.

But some have not done so well with local communication.

Many local Esperanto groups still communicate via monthly or quarterly paper bulletin. It is nice to receive these and feel one's connection to the Esperanto world, but they have several disadvantages: they are expensive to produce and send; they are not particularly timely; because of the expense, the number of recipients are usually limited to those who have paid the club's annual dues.

This is the era of the internet mailing list. A mailing list is a program, running on a server somewhere, that takes a message from any member of the list and distributes it to all other members. Cost is often nothing; most universities provide this service gratis, there are cheap commercial providers, and for those who don't belong to a university and don't want to pay any money, there is always Yahoogroups. Some such providers (e.g. Yahoogroups) offer additional services; for instance, there is often a "Calendar" which allows you to automate the sending of notices about upcoming events. This is particularly useful for repetitive events. Some offer disk space where you can store files of general interest to the list, or photo albums of members or events.

But what the mailing list offers is, most particularly, free access to the Esperanto world for those in a given area who are, for whatever reason, unable to participate in local activities. Anybody interested in Esperanto can get in contact with Esperanto speakers in his or her region via a regional mailing list. Information about events, either regular or special, can be disseminated through the list. Information about the Esperanto movement elsewhere in the world can be provided to local list members.

Some local groups use Yahoogroups. Others use different list-service providers. And, sadly, some of our most active and venerable groups do not seem to have mailing lists at all.

I would recommend that each local group establish a mailing list and name someone to be responsible for it. And when you have such a list, please advise ELNA; one of our standard items that we mail out to information requestors is a sheet containing subscription information for such lists. In that way, we hope to draw new Esperanto speakers into the wonderful world of Esperanto.

NEW MEMBERS July-Aug. 2002

Ni volas bonvenigi al ELNA la jenajn novajn membrojn de la asocio:

Jonathan B. Hall (Bronx, NY)
Normand Legault (Montreal, PQ)
Valerie Moyes (Los Angeles, CA)

Michael Stancliff (St. Joseph, MO)
Jan D. Vromant (Friendswood, TX)
Catherine R. Wooten (Sierra Vista, AZ)

La Ĝusta Sinteno pri la Pronomo *Li*

De Maurice Wittenberg

Ĝis la finaj kelkaj jardekoj de la dudeka jarcento, la sinteno de ni anglalingvanoj pri la angla vira pronomo *he* estis, ke ĝi taŭgas por reprezenti vortojn, kiuj aplikigas kaj al virseksuloj kaj al ineseksuloj, t.e., komungenraj vortoj. Oni ne uzadis la pezan *he or she*, nek la negramatikan kaj eventuale neklaratan *they*. *He* eĉ estis difinita per akto de la angla parlamento meze de la dek-naŭa jarcento kiel signifanta *he or she*. Post tio, dum preskaŭ cent jaroj, tiu difino regis la anglan vortuzon kaj tiuj, kiuj sciis la gramatikon, uzis la pronomon *he* por reprezenti komungenrajn vortojn. La frazo, "Everyone can do what he wishes" estis rigardata kiel korekta. Nuntempe la korekta formo estas "what he or she wishes" kaj la alternativoj estas la negramatika (sed parole en ordo) "what they wish" kaj la gramatika evito, "All can do what they wish". Tiele la sinteno pri la uzado de *he* kiel komungenra pronomo ŝanĝiĝis dum la dua duono de la dudeka jarcento, kaj *he or she* estis trudata, kiel la korekta formo. Ĉu en Esperanto ni devus uzi la formon *li aŭ ŝi* anstataŭ nur *li* en similaj cirkonstancoj?

Mia opinio estas, ke, en Esperanto, ni povas regi nian sintenon pri vortoj kaj uzi ilin tiel, kiel ni difinas ilin. Ni devas subteni la efektivan difinon de la pronomo *li* kiel reprezentanta aŭ *virseksulojn* aŭ *indiferente virseksulojn aŭ ineseksulojn*, t.e., rigardi tiun pronomon kiel ankaŭ komungenra, por eviti la bezonon uzi la formojn *li aŭ ŝi*, *lin aŭ ŝin*, kaj *lia aŭ ŝia*. Ni anglalingvanoj konas la malavantaĝojn de tiuj pezaj formoj.

Oni rimarku, ke Esperanto estas iom malsama ol la angla pri la "sekso" de substantivoj kaj pli similas la germanan (el kiu la sufikso *-in* estis prenita), kiu havas tri genrojn, sed nur, ke en Esperanto la "genroj" estas tute logike disdonitaj. En la angla, la substantivoj, kiuj indikas homojn, povas esti vere komungenraj. Teacher, student, kaj nun eĉ actor

kaj host, estas tute komungenraj kaj oni povas reprezenti ilin aŭ per *he* aŭ per *she*. Sed en Esperanto estas malsame. La substantivoj por senvivaĵoj estas ja tute senseksaj kaj oni reprezentas ilin per la neŭtra pronomo *ĝi*. Bone. Sed kio pri la vivaj estaĵoj? La vivajn estaĵojn indikas substantivoj, kiuj aŭ ne finiĝas per *-in* aŭ finiĝas per *-in*. Se ili ne finiĝas per *-in*, ili (plejparte) estas formale virseksaj; se ili finiĝas per *-in*, ili estas ineseksaj. Ekzistas kelkaj, kiuj havas inan signifon sen la ina sufikso (ekzemple, primadono, megero). Ne ekzistas en Esperanto vere komungenra substantivo por vivaj estaĵoj, kiel en la angla. La bestojn oni kutime reprezentas per la neŭtra pronomo *ĝi*, ĉar ilia sekso estas kutime por ni indiferenta. Sed *bovo* ankaŭ havas la sencon *virbovo* ("Melku bovon senfine, li lakton ne donos") kaj *koko* ankaŭ havas la sencon *virkoko* ("Al feliĉulo eĉ koko donas ovojn"). Inter la substantivoj por homoj, estas same. *Instruisto* ankaŭ havas la sencon *virinstruisto* (germane, *Lehrer*, virgenra) kaj *studento* ankaŭ havas la sencon *virstudento* (germane, *Student*, virgenra). La inaj vortoj estas *instruistino* (germane, *Lehrerin*, ingenra) kaj *studentino* (germane, *Studentin*, ingenra), respektive. Al Esperanto mankas tute komungenraj vortoj, kiel en la angla.

Tiele, estas tri "genroj" en Esperanto, disdonitaj jene: Neŭtra por ne-homoj; pronomo: *ĝi*. Vira/komungenra por homoj kaj por viraj bestoj, kiam ni volas substreki ilian virseksecon; pronomo: *li*. Ina por hominoj kaj por inaj bestoj, kiam ni volas substreki ilian inekseksecon; pronomo: *ŝi*. Sed ni nepre scias de la vorto mem kaj de la kunteksto, kiun genron ĝi devas ricevi, kaj tial, kiun pronomon ni devas uzi por reprezenti ĝin.

En siaj *Lingvaj Respondoj* Zamenhof diras (N 91), "ĉar ni silente interkonsentis, ke ĉiun fojon, kiam ni parolas ne speciale

pri sekso virina, ni povas uzi la viran formon por ambaŭ seksoj (ekzemple 'homo' = homo aŭ homino, 'riĉulo' = riĉulo aŭ riĉulino k.t.p.), per tio mem ni ankaŭ interkonsentis, ke la pronomon 'li' ni povas uzi por homo en ĉiu okazo, kiam lia sekso estas por ni indiferenta." Se ni rigardas tiun diron de Zamenhof kiel difinon, ni havas:

homo = aŭ *homo* aŭ *homo* aŭ *homino*, depende de la kunteksto
li = aŭ *li* aŭ *li aŭ ŝi*, depende de la kunteksto

Tio signifas, ke iu substantivo indikanta homon povas esti rigardata kiel iam vira kaj iam komungenra, kaj la pronomo *li* ankaŭ povas esti rigardata kiel iam vira kaj iam komungenra. Tio devas esti nia sinteno pri tiaj vortoj, ĉar ĝi ebligas koncizecon sen ia perdo de klareco. La lingvanoj de lingvoj, kiuj havas genron (ekzemple, la hispana, la franca, la germana), havas ĉi tiun sintenon pri siaj virgenraj vortoj, kaj tute sukcese esprimas siajn ideojn. Tiaj vortoj devas esti rigardataj kiel hibridoj inter vira signifo kaj komungenra, kaj la kunteksto montros, kian signifon ili devas havi. Se oni diras, "Necesas longa studado fariĝi kuracisto", ni scias, ke *kuracisto* havas la sencon, en tiu kunteksto, *kuracisto aŭ kuracistino*. Simile, oni diras "Kuracisto devas esti singarda, ke li ne malutilu al siaj pacientoj", kaj *li* tie havas la sencon *li aŭ ŝi*.

Mi devas rimarkigi, ke, se oni malatentus la priskribitan interkonsenton pri kaj la homindika substantivo kaj la pronomo *li*, sed ekzemple, reprezentus substantivon kiel leganton per *li aŭ ŝi*, oni estus nekonsekvencaj, ĉar la interkonsento aplikigas al *li* tiel same kiel al la substantivo. Sen la interkonsento, *leganto* signifus nur virseksan leganton. Konsekvence, oni devus uzi la formon *leganto aŭ*

Daŭrigo sur p. 11 ĉe LI

Is Esperanto losing out to English?

Joel Brozovsky

There comes a time in most people's life when basic assumptions and goals come up for review, when we reevaluate our lifestyles, aims, careers, etc. to decide what is really worth investing our limited time and money into. For those of us who have made some kind of commitment to Esperanto, that commitment could come under question, especially at year-end when it is time to renew memberships in the local, national (ELNA), and international (UEA) Esperanto organizations.

Renewal forms and information for ELNA and UEA were sent out late in December, along with the periodical subscriptions form and information, and the first bulletin about ELNA's annual conference for 2003 (at MIT near Boston, 2003 July 3-6). As the economy gets tighter and ELNA finds it harder to keep up financially, some members may be searching more deeply for reasons to keep supporting ELNA and Esperanto.

One member wrote to me a few months ago with such questions. He noticed that in the mass media, English seems to be proclaimed the international language almost everywhere, that interviews on the news from most corners of the world are conducted in English. He has doubts as to the viability of Esperanto. He wrote in Esperanto, "If I could really believe that Esperanto is really making progress and is now more than the pampering hobby of a shrinking minority, I would become interested again." Well, it is certainly not surprising that the US mass media, entirely in English, gives the impression that everyone speaks English. Traveling reporters go to great lengths to find a local English-speaker to interview. Knowledge of English is often a much higher priority in selection of interviewees than any knowledge of the subject matter. This strong English filter of news services is a very good reason to subscribe to the Esperanto news magazine *Monato*, whose reporters are mostly locals writing about what is happening in their own country, in their own native language.

Published estimates of how many

people speak English are not always dependable. My German friend wrote about such a case in Germany: "I once read in a professional magazine for teachers that (some number such as) 56 percent of the Germans speak English; the exact number – somewhere between 50 and 60 according to my memory – isn't important. I asked the institute that did the research for the questionnaire used, and found out that, in order to reach that percentage of English speakers, they added up everyone – from perfect masters to those who claimed, 'I know a few sentences'." Although the number of English speakers is certainly much higher than the number of Esperanto speakers, there is much evidence that English is not taking over the world, and is in fact losing ground. The percentage of English speakers in the world reached a peak in the 1950's at around 11%, and is slowly declining ever since (currently around 8%), according to the most thoroughly researched studies of language populations.

This trend is much more apparent in the Internet. In its infancy, the Internet was 100% English. It spread around the world with a mostly English infrastructure, and many people came to believe that it would be the force to push English into everyone's lives. But a funny thing happened along the way. People who started using the Internet in English began to create their own Internet content in their own languages, and English became less and less dominant. There is now more Internet traffic and content in other languages than in English, and projections indicate that this trend will continue to accelerate for the foreseeable future.

I might add, that the Internet has enabled the dispersed Esperanto community to blossom in a way unimaginable a decade or so ago. If anyone has doubts about the ability of Esperanto to keep itself afloat and to thrive, a look at the sheer quantity of Esperanto material on the Internet should dispel them.

The numbers of speakers of the language are always uncertain; there simply is no sure way to count them. But there are

other indicators that are easier to keep track of and, I think, more pertinent: indicators of the level of use. In the US as in some other parts of the world, Esperanto received much more attention in the mass media in previous decades than it does now. However, a close look at actual usage shows that there has never been as much Esperanto put into practice – here in the US as well as worldwide – as there is right now.

An example given by my German friend Lu Wunsch-Rolshoven is the number of participants in Esperanto gatherings. In 1970 around 50 people participated in a week-long Esperanto get-together in Germany centered around New Year's Day, *Internacia Seminario* (IS). In 1980 there were 150 and in 1990, 300. Another gathering was added in 1980, the *Internacia Festivalo* (IF) for the same week, and two other gatherings in other seasons. Last year there were around 700 participants for the New Year's gatherings in Germany. The attendance has gotten so large that latecomers were turned away from lack of space, so this year a third meeting was added to the choices. In other parts of Europe and the world there was similar growth in participation in Esperanto gatherings and, concurrently, in the number of gatherings. Thirty years ago a World Esperanto Conference (UK) in Europe pulled in an average of 1500 participants; nowadays the average is around 2500.

Passporta Servo, the World Esperanto Youth Organization's hosting service, now offers over 1200 addresses of Esperanto speakers willing to accept traveling Esperanto speakers in their homes for a night or two (or more) free of charge. This service is still growing in size and spreading to more countries (currently hosts are found in over 80 countries). I know of no better way to travel, to make friends, to get to know how other people live and what they think about the world.

The Esperanto music culture has burgeoned in the last 30 years, from a

Daŭrigo sur p. 11 ĉe CO

New Inter-Group Achievement Program is launched

by *Phil Dorcas*

The heart of the Esperanto movement for many people is in the local group. It is the local group or club that is most likely to give assistance to beginners and carry out programs for recruiting new Esperantists. In that light ELNA is launching a program to encourage local groups toward action, growth, and higher achievement. It is the Inter-Group Achievement Program (Inter-Grupa Atinga Programo) or IGAP (Igapo).

The program tracks achievement points that are accumulated until just before the annual ELNA national conference. The highest achieving local groups will be recognized for their accomplishments this July at ELNA's 51st national conference at MIT in Cambridge.

The web page for "Igapo", <www.esperanto-ntx.org/grupoj> has complete information including the current standings. We encourage all local groups to participate in the program. To participate, designate a representative of

your local group or club to send membership counts to me, your local group chairman at ELNA.

There are three group sizes, small (up to 9 members), medium (10 to 29 members), and large (over 30 members). Points will be tracked separately for those three divisions. Points will be awarded as follows:

- 1 point per local group member
- 10 points per new member acquired during the program duration.
- 2 points per member in ELNA, 2003 calendar year
- 2 points per member in AAIE, 2003 calendar year
- 2 points per member in UEA, 2003 calendar year
- 2 points per member in USEJ, 2003 calendar year
- 2 points per member in TEJO, 2003 calendar year
- 5 points for having a web presence

5 points for having a newsletter
5 points per AAIE or UEA examination certificate (awarded during program)

As you can see from the list, IGAP points are awarded for groups with more members, but there is a huge benefit for gaining new members, being active in teaching, or passing the standard tests. If you have questions or wish to participate, go to the Igapo website, or contact me by phone, email, or regular post.

By all means, discuss IGAP with your local group or club. If you do not have a local group in your area, then we have lots of ideas on how to get one started.

Igape,

Filipo

Phil Dorcas

vicprezidanto and estro por lokaj grupoj

<pdorcas@sbcglobal.net>

ELNA Financial Situation

By *Ellen Eddy, Secretary*


During the last five years, ELNA has experienced a steady outflow of money from the Capital Endowment Fund that has only worsened as the economy and interest rates continue on a downward spiral. The Board has worked hard to find solutions to this problem, but has been unable to stem that flow. This year the Board agreed that we could use only \$25,000 from the Capital Endowment Fund to keep the office running at the same level as in the past. We presented a balanced budget for 2002-3 in an unusual way. We took unspent accrued interest from a couple of restricted funds (the capital was not touched), allotted money from a couple inheritances to the General Operating Fund (a one time occurrence) and budgeted no more than \$25,000 from the Capital Endowment Fund. Some Board members personally pledged their own money to guarantee the salary of the newsletter editor (\$2400 a year). We also stipulated that if the money situation did not improve by February 2003, we would have to let Vice-Director Don Harlow go. If the Vice-Director is let go, that

means all the work will fall on one person, the Director of the Central Office, Joel Brozovsky. Since he cannot possibly do the work of two people, that means services will be cut. The biggest cut could be in the catalog services. According to previous Vice Director, Ionel Onet, the book services took 75% of his time. The Board has strongly been against cutting this service, but it may have no choice. We have discussed cutting back to only ELNA published books, a few learning materials, and dictionaries. All other purchases would have to be made through UEA and other book services.

This situation is upsetting and you may ask what you can do to improve it. First you must realize that ELNA can not operate at its present level on membership alone. Membership fees cover only a part of ELNA's costs. Donations to the Capital Endowment Fund or the General Operating Fund are the most helpful. If your employer offers to match your donations, all the better. In fact, the C.O. has created new membership categories where members can not only renew, but renew

at a level that will bring extra money into the General Operating Fund. You can talk to Bill Harmon, who is in charge of Wills and Gifting, about how you can leave money to ELNA after your death. This, of course, will be kept confidential. You can also find new members and/or order more materials from the ELNA catalog. And if you are lucky enough to know someone who donates to worthy causes, you can talk to your friend about ELNA and its goals toward world peace and understanding. All these actions can make a big difference in the future of ELNA.

For more detailed information, ask the C.O. to send you a copy of this years Annual Reports and a copy of the budget for 2002-3. This will show you what ELNA is doing for you and how the money you send is spent. This information is also available on line for members only at: <http://esperanto-usa.hypermart.net/raportoj/jarraportoj2002/>. You will need the identity word: **membro** and the password: **elnagado**.



Pilger, Wouter F.: Baza Esperanta Radikaro, UEA, Rotterdam, 2001. 159p. Broŝurita. Ĉe ELNA: BAZ001, \$9.00

Tiuj el ni, kiuj uzis Esperantlingvajn instruilojn sen nacilingvaj klarigoj, scias, ke ofte eĉ plej simplajn kaj ĉiutagajn nociojn la aŭtoroj klarigas (aŭ mal-klarigas) per nebulaj aŭ eĉ strangaj difinoj. Ĉiu, kiu instruis Esperanton rektamete aŭ mentore helpis al komencantoj aŭ progresantoj kaj penis demonstri, ke oni ekde la unuaj paŝoj povas ĉion klarigi en Esperanto, scias, kiel malfacile estas navigi inter enuiga pedanteco de detalaj klarigoj kaj malklareco, ambigueco de eksplikoj koncizaj. Kaj la kutimaj vortaroj ne ĉiam helpas en tio, ĝuste ĉar ili mem ofte pekas per unu el tiuj ekstretoj. Ekzemple, la radikon 'don-' PIV difinas per proksimume 150 linioj de densa teksto. Kompreneble, tiaj harfendaj detaloj gravas por lingvistika esplorado, sed ne por kompreni la kernan signifon de la vorto. Aliflanke, kion oni ĉerpas el la difino 'elano = antaŭensvingiĝo', se oni ne jam scias la signifon de la vorto? (Tiun ĉi ekzemplon mi intence prenas el la glosaro de unu el la lastaj verkoj de G. Waringhien, la ĉefaŭtoro de PIV.)

La recenzata verko estas vortareto, kiu modele solvas tiun ĉi problemon. Ĝi glosas la pli oftajn kaj utilajn vortojn de nia lingvo kaj estas plejparte bazita sur 'Baza Radikaro Oficiala' de la Akademio de Esperanto (ĉ. 2500 vortoj), al kiuj Wouter Pilger aldonis kelkcent pliajn radikojn - 'iuj estis bezonataj por klarigi aliajn vortojn; iuj estas nuntempe pli ofte uzataj; aliaj estas "gramatikaj" vortoj, utilaj por paroli pri lingvo'. Pro la produktiveco de la vortfarado en Esperanto, tia radikonombro ne estas tiel malgranda, kiel ŝajnas unua-vide. Tiu, kiu aktive ekposedos tian vortprovizon, havos tre solidan leksikan bazon. Krome, la avantaĝo de tia zorgema elekto estas, ke oni povas senriske alproprigi ĉiujn vortojn el la vortaro kaj libere uzi ilin, kion oni preferu ne faru, se oni uzas aliajn, 'grandegulajn' vortarojn, por ne


polui sian lingvajon. La radikoj en la vortaro estas tre oportune dividitaj en grupojn - grupojn 0-6 (proksimume 950 el la plej gravaj radikoj) estas aparte markitaj per speciala signo.

Notu, ke tiu ĉi verko ne estas akademieca vortaro. Nebazajn kaj malpli oftajn signifojn de la vortoj, la vortareto ellasas. Krome, kiel skribas la aŭtoro, ĝi 'ne estas "difin-vortaro". Ĝia celo estas nur, helpi al tiuj, kiuj legas ion en Esperanto, kaj renkontas nekonatan vorton en *kunteksto*, kompreni ĝin, donante indikojn per kiel eble elementaj vortoj.' Por atingi tiun ĉi celon, Wouter Pilger sekvas specon de la principo de sufiĉo kaj neceso - li difinas nur tiom, kiom necesas por klare kompreni pri kio temas, sed ne pli! Tamen tiu ĉi deklarita celo sendube ne estas la sola apliko de la vortareto. Mi opinias, ke instruistoj de Esperanto, speciale instruistoj-komencantoj, ĉerpas el tiu ĉi vortaro koncizajn, klarajn kaj, nemalofte, elegantajn difinojn. Ekzemple, 'doni = havigi, enmanigi, mal-preni'.

Uzi la vortaron estas facile. Mi konsentas kun la aŭtoro, ke '[t]iuj, kiuj finis elementan Esperanto-kurson, sen problemoj uzos ĉi tiun vortaron'. Aliflanke, ĝi estas agrabla kaj utila legaĵo ankaŭ por sperta esperantisto aŭ instruisto de Esperanto: estas agrable kaj edife vidi kian klarecon atingas la aŭtoro per mirinde koncizaj kaj simplaj difinoj! Kaj per uzado de tiu ĉi vortaro oni povas lerni la malfacilan arton lakone klarigi. Tia kapablo utilas ne nur en Esperantujo.

Preseraroj en la vortaro praktike forestas. La malgrand-formata libreto aspektas plaĉe kaj leg-invite, kaj ĝiaj paĝoj estas kunkudritaj, sed ne algluitaj, kaj do ne elfalos pro ofta uzado - la leganto ja nepre uzegos la vortareton!

Alexander Shlafer



Polo, Marko: La libro de la mirindaĵoj, aŭ La priskribo de la mondo. Tr. Moirand, Daniel. Serio Oriento-Okcidento n-ro 34. Rotterdam, UEA, 2001, 445 pĝ. Ĉe ELNA: LIB007, \$36.90.

Tra granda parto de la 20a jarcento, Marko Polo estis en Usono ĉiutage konata nomo: La homo kiu alportis al Eŭropo de Ĉinio materialojn kaj procedojn: pulvon, nudelojn, presadon,

ktp. Jen lastatempa traduko de la skribado de tiu esploro kiu laŭdire kun la onkloj vizitis Ĉinion kaj aliajn aziajn landojn je la fino de la 13a jarcento.

Antaŭparolon ampleksan (44-paĝan) la tradukinto prezentas al ni. Li traktas interalie, la familion Polo, aferon pri diversaj manuskriptoj (pli ol 140), la historian kaj geografian kuntekston. Li donas detalojn pri Eksterkutimaj Vortoj (ekz. specoj de falkoj, diversaj mezurunuoj) kaj ortografiajn aldonojn necesajn por montri sonojn ne ekzistantajn en Esperanto. Fakte, oni povas diri, ke la Antaŭparolo estas pli interesa ol la rakonta teksto mem.

Ene de la rakontado troviĝas multaj piednotoj: Ekz. Kiu estas la aktuala nomo (certa aŭ ebla) de loko kiun Polo priskribas por ni? Kaj la notoj ofte klarigas al ni, ĉu iu eldiro estas vera, ebla, probable nevera, kombino de apartaj spertoj, nuraj onidiroj. La stilon de la traduko oni reklamas "verva." Kaj tia ĝi ja estas. Laŭtleĝu, kaj via lango facile saltados tra plejparte plaĉa ritmotempo. Tamen la manuskripto abundas je ripetadoj kaj malvariaĵoj en stilo. Tiel, ke ofte ne facilas longe daŭrigi la legadon sen sento de enuo.

La detaloj en la teksto levas la oftajn demandojn pri raportado en gazetoj kaj aliloke. Kiuj detaloj fakte prezentas la veron? Kiujn la skribinto misaŭdis, mismemoris? Kiujn li elpensis nur por amuzi aŭ kapti la intereson? Kiujn li aŭdis de aliulo kaj ŝajnis ke ili estas laŭ lia propra sperto? Per helpo de la tradukinto, eblas iugrade fari juĝojn pri tio.

Kaj restas afero: Ĉu Marko Polo vere vizitis Ĉinion kaj aliajn aziajn lokojn? Kial ne ekzistas en samepokaj ĉinaj analoj raportoj pri lia vizito? Sed se tio vere ne okazis, kial certaj detaloj estas tiel ekzaktaj, ke preskaŭ ne eblas priskribi ilin sen propra sperto? La tradukinto prezentas interalie lastajn esplorojn, kiuj klarigas ke ne plu eblas diri ke la tuto estas falsajo.

La libro kapablas stari en si mem kiel ĉefkonsultilo en kurso pri la vojaĝoj de Marko Polo.

R. Jaderstrom

La BONVOLANOJ

de Lusi HARMON

La finaj videobendoj de *Esperanto, Pasporto al la tuta mondo*, jam filmiĝis, redaktiĝis, kaj reproduktiĝis! Fakte, se vi mendis la serion, ili jam estas survoje al vi. Se vi ankoraŭ ne ricevis ilin - nepre anoncu al la ELNA-oficejo. Se vi nur mendis ĝis leciono 12, la oficejo atendas vian mendon - kontraŭ \$95.00. La tuta serio kostas \$325.00 - sed se vi havas planon por uzi ilin por instrui, petu subvencion.

En leciono 13, vi renkontos novan rolanon - Bardo - kiu bonege kantas al Helena! Parte pro tio, kaj parte pro la fakto ke ni havis tro da materialoj por la planitaj 15 lecionoj, mi decidis krei 16 epizodojn - kontraŭ la sama prezo por la 15! Leciono 16 inkluzivas parton de la historio de la projekto (el la originala reklam-video) kaj ĉiujn

originalajn kantojn de la serio - inkluzive unu kiu neniam antaŭe aŭdiĝis.

Ni Bonvolanoj opinias ke vi, kiel parto de la granda rondo familia de Bonvolanoj, ĝuegos la tutan serion! Kaj se vi intencas instrui Esperanton, vi trovos la serion elstara ilo. Por vi, speciale kiu ne spertas pri instruado de fremdaj lingvoj, Dr. Duncan Charters nun verkas libron por uzo kun la bendoj, tekstoj, kaj ekzercoj. Ni planas ke la originala versio de la libro estu preta por aĉetado proksimume je la fino de januaro — je kosto.

Ni ankoraŭ redaktas nun la videon filmitan dum la ELNA kongreso en Sakramento kiu estos uzebla por montri kiel uzi la bendojn. Kaj la libro kaj la video, *Kiel Uzi Pasporto-n por instrui Esperanton*, estos tre helpaj al ni

ĉiuj por krei Esperantistojn.

